
nia Colégio Pedro II - Humaitá II[1] reveninte alportas balenon al Rio-de-Ĵanejro - ĉi tiu estis mia unua vido de baleno. Eble estas nur koincido. Ne gravas, certe nia kampanjo alportos eĉ pli da balenoj. Hodiaŭ vespere mi reiros al plaĝo por ekvidi ilin.

**Teknikaĵoj.** Oni povas legi ie ke ĝiba baleno estas granda mamulo kiu vivas en akvo. Teknika klasifiko estas[1]
Regno: Animaloj (*Animalia*)
Filumo: Ĥorduloj (*Chordata*)
Klaso: Mamuloj (*Mammalia*)
Subklaso: Placentuloj (*Eutheria*)
Ordo: Cetacoj (*Cetacea*)
Subordo: Bartocetacoj aŭ Lamencetacoj (*Mysticeti*)
Familio: Balenopteredoj (*Balaenoptiidae*)
Genro: Megaptero (*Megaptera*)
Specio: M. Ĝibdorsa (*M. novaeangliae*)



**Figuroj.** La figurojn mi prenis el citaĵo [1] je 2010/07/12. Orde ili estas: de Mila Zinkova, 2007/05/23, de Achim Raschka, 2005/03/18, de Ken Balcomb, 2007/04/19, de Eberhard von Nellenburg, 2006/01/22 kaj de Chris huh, 2006.

## Citaĵoj

[1] Vikipedio (2010/julio/12), "*Ĝiba baleno, megaptero ĝibdorsa*", http://eo.wikipedia.org/wiki/Ĝiba_baleno

[1] Lernejo en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo.

Esperanto per Gutoj de Saĝo

# VIVO KAJ VIBRO

Numero 2, 2010 julio, 17

Ĉi-numere legu pri

## Baleno en Rio-de-Ĵanejro

Filipe de Moraes Paiva[a]

**Resumo**: Frue matene, 2010/julio/12, praktikante tajĝĉŭanon sur placo ĉe la plaĝo, mi havis mian unuan renkonton kun baleno, okazita en Leblono, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Jen mia rakonto de renkonto.


[a] Departamento de Física, U.E. Humaitá II, Colégio Pedro II, Rua Humaitá 80, 22261-040 Rio de Janeiro-RJ, Brasil; fmpaiva@cbpf.br

**Vibro kaj Vivo** estas revuo de scienco, arto kaj ĝenerala saĝo.
Eldonanto:
Filipe de Moraes Paiva
VEKCPII - Vin Esperanto Klubo
Colégio Pedro II, U.E. Humaitá II
Rua Humaitá 80
22261-180 Rio de Janeiro - RJ
Brazilo
vibrokajvivo@gmail.com

**Rakonto.** Hodiaŭ, kiel kutime, mi estis matene, tre frue, praktikante tajĝiĉŭanon en "Pontal do Leblon". "Pontal do Leblon" estas placo ĉe plaĝo en kvartalo "Leblon" en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Al alilandanoj, Leblona plaĝo estas apud Ipanema plaĝo, kiu estas apud Kopakabana plaĝo. Do, kiel mi diris, mi estis praktikante tajĝiĉŭanon en "Pontal do Leblon", tre frue matene, kiel kutime. Movadoj malrapidaj, ĉu fronte al montoj, ĉu fronte al strato, ĉu fronte al maro. Iam, kiam fronte al maro, mi vidis fore ion malklaran flosantan, duone de plaĝo al foraj insuloj.



Sed mi perceptis, dum malrapidaj movadoj de tajĝiĉŭano, ke tiu io ĉu malflosis ĉu flosis, kaj eĉ moviĝis! Ne estis io, ĝi estis baleno! Tiam mi jam tute haltigis la movadon de tajĝiĉŭano, estante tute senmova je unu sola formo, dum mi provis kompreni tion kion mi vidis. Tiam kiam mi identigis la balenon, ĝi subakviĝis kaj malaperis.



Tiam mi disparolis al personoj kiuj gimnastikis ĉirkaŭ mi kaj ni ĉiuj kune reserĉis la balenon. Ne, ne estis iluzio. Tuj ni ankaŭ ĉiuj vidis ĝin. Ni supreniris al belvedero de Leblono, apud la placo, kaj estiĝis tie mirante la balenon, ĝis nun kiam mi nune skribas ĉi tiun rakonton. Estis pluraj mevoj flugante ĉirkaŭ la baleno, eble manĝante fiŝojn ĉirkaŭe. Interese, ĝi estis pli da tempo kapomalsupren, kun la vosto ekstere akvo, ol spirinte. Iam ni vidis ĝian kapon. Ĉiam kiam ĝi aperis, ĉu voste ĉu korpe ĉu apenaŭ ĵetante akvon, ĉiuj estiĝis kontentegaj montrante la balenon al ni mem.




Mi pensas ke estis ĝiba baleno, laŭ mia memoro de tia baleno. Vere nune oni povas legi pri mia baleno en ĵurnalo, ke ĝi estas fakte ĝiba baleno, kiu migras norden je vintro. Eble la energioj de nia kampanjo pri speciga kolektado de balaaĵo en